

Estimataj gesamideanoj,

Bonvenon en COLMAR, en la centro de Elzaso/Alzaco! Via dinamika prezidantino petis, ke iu prelegu pri Comar kaj nia regiono Elzaso/Alzaco, kion mi plej volonte faras, ĉar mi naskiĝis en ĝi, eĉ se nur mia patro originas de ĝi, dum mia patrino naskiĝis en pli orienteŭropa landaro, tiam nomata Aŭstrohungara Monarĥio. Tio nur por dekomence precizigi, ke ami sian naskiĝregionon aŭ -landon ne signifas malami la restantan mondon! Mi certe ankaŭ pro tio iĝis esperantisto. Kaj mi tuj citas embleman poemon de miavilaĝa internacia ĵurnalisto/verkisto, kiu bedaŭrinde – ankoraŭ - ne kredas je Esperanto:

Viajn radikojn kroĉu alĉiele
kaj surgrimpu la stelojn

Eliru vian truon
Eliru vian kelon
Forlasu vian kaĝon
Forlasu vian timon

Viajn radikojn kroĉu alĉiele
kaj surgrimpu la stelojn

Vi malkovros, fine, trans la limoj
aliajn landojn, aliajn korojn

Vi malkovros fine trans la limoj
Vian propran landon, vian propran koron. Martin Graff

Nia normo-dona leksikono PIV (Plena Ilustrita Vortaro) nomas mian regionon Alzaco. Daŭre mi min demandis, kial ne Alzaso – la franca vorto Alsace (Alzas) signas la sonon „s“ . Sciu, ke franco, kiu legas la esperantan vorton Alzaco ĝin prononcas Alzako, kaj tio estas finomo por loĝantoj de nia regiono en la franca lingvo. Mi klarigas la elekton de „c“ pro la ankoraŭa ĉefeco de la skriba lingvo. Aŭ la vorto estis kreita ekde la latinigo Alsatia. Nu, mi emas uzi la terminon, kiun la esperantistoj lokaj kutimis uzi, kiam Elzaso-Mozelo estis parto de la Dua Germana Imperio (1870 – 1918). Oni tie ja dum jarcentoj parolis ĝermanajn dialektojn. Ĉi historion mi nun havas la plezuron rakonti al vi.

Mi precizigu, ke mi ne estas profesia historiisto, mi do ne fakas pri dujarmila periodo de nia historio! Sed direktante mian prezenton al Esperantistoj mia gvidmotivo laŭlonge de la prelego estos lingvaj kaj identecaj aspektoj.

Okcidente la Vogeza Montaro, oriente la Nigra Arbaro kaj intere, en la ebenaĵo, fluas la rivero Rejno, kiu de tempo al tempo severe disigis/disigas ambaŭ terpecojn. Laŭ la nuna stato de la landaj mapoj, ni do situas en limregiono. **Vi do ja aŭdos pri problemoj de limregiono laŭlonge de la prelego, kaj pli intense ĉe la fino de mia paroladeto**, se ĝis tiam... vi ne endormiĝis!!!

Fakte antaŭ milionoj da jaroj la geografia situacio ne estis tia! Antaŭ la naskiĝo de la Alpoj ŝajne ekzistis altebenaĵo. Nur kiam la Alpoj aperis, ĉi altebenaĵo enfalis kaj ambaŭflanke de la ebenaĵo restis la montoj Vogezoj kaj Nigra Arbaro, kiuj iom post iom ŝrumpis ĝis la nuna stato. Jen kion oni rakontis al ni en la lernejo!

Nu! Vi ja scias, ke problemoj naskiĝas nur ekde la momento, kiam la HOMO, kun granda H aperas kaj enmiksiĝas. Dank'al la arkeologoj, kiuj fosas kaj fosadas ni trovas restaĵojn, postsignojn de homa vivo, kiujn oni poste „interpretas“ kaj klarigas al ni. Pli detalajn informojn ni ja ricevis nur de la popoloj, kiuj kapablis komuniki skribe, postlasinte surŝtonajn enskribojn aŭ eĉ pli kompletajn tekstojn sur tanitaj feloj, sur ligno aŭ sur papero. Ekde tiam ilia kunvivado, rivalado, interbatalado, interbuĉado ebligas studi ilian historion, kio malgraŭe ne malhelpas interpretadon laŭnecesan!!! Ekde tiu periodo mi traflugos la lastajn 2000 jarojn, eĉ se nur supraĵe!

Ŝajnas do, ke loĝis en nia regiono la keltoj, pri kiuj ni lernis multe pro la elfosaĵoj de niaj modernaj arkeologoj. Pluraj muzeoj en Elzaso kaj en la transreja Baden-Virtembergo montras interesajn restaĵojn de civilizacio, kiuj atestas pri manlabora kaj teknika kapablo. Pri ili ankaŭ skribis la romianoj, kiuj milite „turismis“ kaj atingis Strasburgon (Argentoratum) en la jaro 58 antaŭ Kristo. Laŭ la legendo eĉ Herkulo, la fortikulo, batalis en la regiono (Kiam??!!!), trinkis bonan vinon, kiun liaj samgenteroj jam kultivis en la regiono, ... kaj endormiĝis. Kiam li vekiĝis kaj foriris, li forgesis sian klabon, kion memorigas Colmar per la

klabo en la blazono de la urbo. Tio estas legendo, sed la vitoj alportitaj de la romianoj daŭre veras.

Kunvivis do du lingvoj en la regiono, la kelta – ĉu lingvo, ĉu lingvoj ? (Pro manko de skribaj atestoj oni ne multon scias pri ĝi aŭ ili) - kaj la latina. Ĉar la romianoj jam atingis altan gradon de civilizo, de politika kaj ekonomia organizo, pri kio atestas multego da ruinoj kaj skribaĵoj malkovritaj laŭ la jarcentoj, aliaj popoloj ankaŭ emis vivi tiel agrable kaj multon lernis de ili, eĉ se ne sufiĉe, kiel tion atestas tumultaj periodoj postaj.

Iom post iom ĝermanaj popoloj plej diversaj transiris la Rejnnon kaj miksiĝis kun la kelt-romia loĝantaro, plej verŝajne tio ne ĉiam nur pace – pensu pri la nunaj modernaj tempoj kun la nunaj tiel inteligentaj nuntempuloj !!!

Aldone: ekde la 3-a jarcento la sovaĝa hunna tribestro Atila ekrajdis kun siaj sovaĝaj tribanoj ekde la plej ekstrema oriento. Ĉu ili fuĝis pro klimata malvarmiĝo en sia hejmlando ??? Nu fuĝis pro ili diversaj pli okcidentaj popoloj ankoraŭ pli okcidenten dum ĉi granda migrado de la popoloj .

Ĉar la romia civilizo tiam ekdisfalas, instaliĝis ĉi tie, ĉirkaŭ Colmar ĉefe la alamanoj! Lingve do verŝajne kunvivis – tre skize dirite - miksaĵo de keltoromanioj kaj de alamanoj.

Iom post iom kreiĝis pli grandaj reĝlandoj inter aliaj tiu de la franka reĝo Klodvigo (481-511) , kiu venkis la alamanojn kaj iĝis kristano, eĉ katoliko dependanta de la papo, kaj ne ariano laŭ la kutimo de la aliaj ĝermanaj popoloj kristaniĝintaj (Tiu ĉi dubis pri la dieco de Jesuo). La franca historiografio difinas Klodvigon, kiel la unuan reĝon de franca reĝlando (kvankam li parolis ĝermanan dialekton, pri kio oni silentas en kvazaŭ ĉiuj libroj pri historio!!!) li estis la fondinto de la dinastio de la „merovidoj“.

Venis poste la Karolidoj kun Karolo la Granda (742-814). Pri Karolo la Granda ĉiuj francoj ankaŭ kredas, ke li parolis france! Li ja eĉ kreis lernejojn por ĉiuj!!!

Gravaĵo prilingva:

Grava evento prilingva okazis en 843 okaze de la Traktato de Verdun, kiam la nepoj de Karolo La Granda, filoj de Ludoviko la Piulo, dividis la imperion inter si. Karolo la Kalvulo ricevis la okcidentan Frankion (kiun oni nomis poste Francio ekde la jaro 1200). Lotaro la Unua ricevis la mezan Frankion kun Italio kaj Frizlando (proksimume la nuna Nederlando), kaj Ludoviko la Ĝermano ricevis la orientan Frankion.

Fakte jam la 14-an de februaro 842 Karolo la Kalvulo kaj Ludoviko la Ĝermano sin ligis kontraŭ sia frato Lotaro la Unua okaze de la **ĵuro de Strasburgo**, kiu estas simbola por la lukto inter lingvoj: Ludoviko la Ĝermano prononcis sian ĵuron en la romana lingvo, por esti komprenata de la soldatoj de Karlo la Kalvulo, kaj tiu ĉi prononcis ĝin en la tudeska, do ĝermana lingvo, por la soldatoj de la frato. **Tio estas la unua grava dulingva dokumento de la regiono.**

De la 11-a ĝis la 13-a jarcento regis la Ŝtaŭfen-dinastio, aŭ pli nobele la Hohenstaufen-dinastio (Frederiko La Ruĝbarbulo kaj Frederiko la II-a. La Ŝtaŭfen-oj devenis de Ŝvabio kaj konstruis plurajn defendoburgojn en la regiono. Ekzemple la Hohkoenigsburg (france: Haut-Koenigsbourg), kiun vi povos viziti dum ĉi tiu kongreso. Ĉar tiu tiama imperio ne havis ĉefurbon, ekzistis pluraj ĉefrezidejoj, ekzemple en Hagenau (Hagenau), norde de Elzaso, kie Frederiko la Ruĝbarbulo laŭdire venis ĉasadi en la vastaj arbaroj. Frederiko la 2-a de la sama Ŝtaŭfen-dinastio (1220 ĝis 1250) estis reĝo de Ĝermanio, de Sicilio kaj de Jerusalemo.

Ĉar la etaj regionoj dependis plej ofte de lokaj senjoroj kaj ĉar ne facilis la kontaktoj kun pli altaj reprezentantoj de la imperio, la urboj – kiuj iom post iom komencis grandiĝi kaj estis ĉirkaŭigitaj de remparoj – komprenis, ke la plej efika maniero por sin defendi estis sin grupigi. Tio okazis en nia regiono: en 1354, 10 liberaj urboj (liberaj urboj estis urboj, kiuj dependis rekte de la imperiestro) decidis sin grupigi. Tiu grupiĝo nomiĝis la Ligo de la Dek Urboj kaj pludaŭris ĝis 1679, do post la ekregado en Elzaso de la franca reĝo Ludoviko la 14-a. Okaze de danĝero tiuj ĉi dek urboj (okaze eĉ 12) ĵuris reciprokane helpon kaze de atako. Inter tiuj ĉi urboj unuarangis Colmar (laŭ franca nomo nuna, por ke vi povu ilin pli facile trovi sur mapo: Hagenau, Wissembourg, Turckheim, Obernai, Kaysersberg, Rosheim, Munster, Sélestat, Mulhouse).

Post kaosa transiro aperis la Habsburg-dinastio en la svisa kantono Aarau (Aaraŭ), kie troviĝas la burgo de la familio. Ili ankaŭ posedis havaĵojn en la limoj de la nuna departemento Alta Rejno (Haut-Rhin – Ho Rin) kaj parte en Bas-Rhin (Ba Rin) inter Bazelo kaj Strasburgo, ankaŭ en la proksima Badeno: Breisach (Brajzah) – Frajburgo). Alia fama posedaĵo estas la daŭre ekzistanta renovigita romanikstila abatejo de Ottmarsheim (Otmarshajm), eksa abatejo.

Estis elektita reĝo Rudolfo la Unua. Tiam en 1431 la urbeto **Ensisheim** (Ensishajm) (inter Colmar kaj Mulhouse) iĝis la ĉefurbo de la regno nomata Vorderösterreich (Antaŭa-Aŭstrio). Ankoraŭ ekzistas la administreja konstruaĵo, en kiu nun troviĝas muzeo. (En ĝi ankaŭ videblas meteorito, kiu falis tie en 1492 - Dato de la malkovro de Ameriko. Ĝi estas la unua falo de meteorito, kiu estis oficiale registrita en Eŭropo.) Cetere: inter 1584 kaj 1634 oni emisiis en Ensisheim la tiaman moneron Thaler. Ĉu la pramonero de

DOLLAR? - diras fiere la elzasanoj!!!

Dum la Tridekjara Milito la urbo Ensisheim estis detruita sepfoje kaj la Habsburgoj translokgis la administojn al Freiburg.

Sed mi ne deziras tro rapidi, ĉar antaŭ la Tridekjara Milito okazis en la oriento de la nuna teritorio de Germanio kaj en Elzaso-Badeno kaj la germanlingva Svisio eventoj historie ege gravaj kaj **decidaj por la estonto**, sed ankaŭ teruraj por la geloĝantoj de tiuj regionoj – eĉ se ankaŭ poste pluis la teruro dum la sekvanta Tridekjara Milito:

La iniciatinto estis germana monako, kiu ne plu eltenis la superregon de la katolika eklezio. Li najlis ,en 1517 naŭdek kvin tezojn sur la pordego de la preĝejo de Vitembergo. Resume: li deziris „rektan telefonlinion inter la kredanto kaj sia dio“. Pli kompreneblis por la simplaj popoloj la kondamno de la korupteco en la katolika eklezio, kiu vendis la famajn indulgencojn por -laŭdire – eviti la purgatorion.

La ideoj de libereco – kompreneble ne nur religiaj - trovis fekundan terenon ĉe la etnobeloj kaj la mizere vivantaj kamparanoj, kiuj ekribelis kontraŭ siaj senjoroj postulantaj pli kaj pli da impostoj. Ilin subtenis multaj gravaj pentristoj/ilustristoj: Matthias Grünewald, la pentristo de la altarpaneloj videblaj en la muzeo Unterlinden en Colmar, Cranach la Maljuna, Dürer, ktp. Cetere: pluraj inter ili estis persekutitaj, ekzemple Grünewald, kiu mortis post fuĝo. La reago de la eklezio kaj de la elituloj tiamaj estis plej teruraj: en Elzaso, en **1525**, la kamparanoj, kiuj sin arigis ĉirkaŭ la flago kun la laĉo-ŝuoj (emblemo de la ribelantoj) estis gvidataj de la kamparano Erasmus Gerber. Li sukcesis arigi **plurajn milojn** da kamparanoj. Por sin nutri tiu amaso prirabis ĉefe monaĥejojn kaj burgojn. Tiel diversaj aŭtoritatoj alvokis la dukon de Loreno, kiu komencis masakri ilin helpe de siaj dungitaj soldatoj. Unue la Duko promesis al la venkitaj restantaj kamparanoj savi ilian vivon, se ili rifuzas plubatali, sed tamen li ĉiujn amasbuĉis en la nordelzasa urbo Zabern/Saverne: per la montpasejo de Zabern estis plej facile atingi Elzason.

Ekde tiu periodo ekzistas en Elzaso la suspekto, ke la lorenanoj ne estas fidindaj. Daŭre, en la nunaj ŝercoj, oni primokas la lorenanojn.

Temis do pri preskaŭa revolucio, simple por akiri garantion de pli facila vivo kaj libereco, sen troaj impostoj. Necesas precizigi, ke jam la itala poeto kaj verkisto PETRARKO skribis en la latina la verkon *Rimedoj kontraŭ malbonŝanco kaj bonŝanco*. Tiu alvoko al memserĉado ebla de rimedoj kontraŭ ĉiuj ajn problemoj estis presita en la latina lingvo en Strasburgo en 1474, sed tradukita al la loka ĝermana lingvo nur en 1518. Por tiuj, kiuj ne kapablis legi, nekonata desegnisto ilustris la verkon. Tiuj ideoj de libereco – origine unue laŭ religia vidpunkto - do jam cirkulis inter la intelektuloj pere de la latina lingvo.

Tiu sama Petrarko ankaŭ skribis: „La amo de popolo estas malpeza, sed pezas ties malamo“.

Cetere: Luther estis kompreneble persekutita de la katolika eklezio. Feliĉe amikoj lin kaŝis en la burgo Wartburg, apud Eisenach. Tie li realigis alian gravaĵon: vi ja scias, ke li tie tradukis la Bibliion el la greka al iu germana lingvo komprenebla de la parolantoj de la mozaiko da dialektoj en germanlingvaj regionoj. Kaj: jam ekzistis dank'al Gutenbergo kaj ties modernigo de la presarto (Gutenberg laboris de 1434 ĝis 1444 en en Strasburgo, poste en Majenco) la ebleco disvastigi pli rapide ideojn. Tiel li atingis pli da homoj ol nur la ekleziulojn kaj aliajn elitulojn.

Mi ĉi tie insistu, ke tian ribeladon kaj buĉadon Luther ne deziris, lin interesis teologiaj ŝanĝoj kaj li fine kondamnis tiujn kamparanajn ribelojn. Sed la semoj de iom da libereco ekĝermis, eĉ se la vivreguloj en la regionoj, kie tiam regis la protestantismo, estis iel kompareblaj al tiuj de rigora nuna islamismo. La morala rigorego kaj mallibereco estis ega!!!

Ĉar ni nun troviĝas en Colmar, mi donas al vi informon, kiun vi eble ne konis: loĝinto de COLMAR, kiu laŭdire ne bone regis la latinan, verkis la unuan romanon verkitan en la germana lingvo: temas pri Jörg WICKRAM (1505 – 1565) kaj la titolo de la romano estas GALMY (kavalira romano ĉi-epoka).

Sed mi insistu refoje: ĉi liberigon de la ideoj jam preparis en la antaŭa jarcento kleruloj. Elzaso situas sur granda komunikoakso de sudo al nordo kaj allogis multajn vojaĝantojn kaj artistojn. Elzaso do partoprenis en la diskonigo de la intelekta, religia kaj arta renoviĝo, de la Renesanco, de l'humanismo.

La granda nomo de l'humanismo estis kaj restas **Erasmus de Roterdamo**, kiu vojaĝis tra Eŭropo kaj ankaŭ loĝis kaj prelegis en Elzaso, Badeno kaj Bazelo.

Elzaso iĝis bredejo de humanistoj, kaj ni ne imagu, ke ĉi tiuj intelektuloj estis nur enĉambraj intelektuloj! Multaj vojaĝis tra Eŭropo kaj nutris sian intelekton en diverslokaj monaĥejoj kaj naskiĝintaj universitatoj. Permesu, ke mi legu kelkajn nomojn, por ke vi almenaŭ ilin aŭdu! Vi povas ilin trovi laŭ la stratnomoj de diversaj urboj.

•**Jacques Wimpfeling** (1450–1528), kiu ege disvolvis la Humanistan Bibliotekon de Schlettstadt/Sélestat.

•**Beatus Rhenanus** (1485-1547), kiu donacis sian kompletan bibliotekon al tiu biblioteko (nun en kompleta rekonstruo kaj renovigo).

•**Martin Bucer** (1491–1551): li konigis Luther kaj la Reformacion en Strasburgo.

- Jakob Spiegel (1483–1547)
- Hieronymus Gebweiler (1473–1545)
- Hans Sapidus (1490–1561)
- Jakob Taurellus (1524–1579)

Geiler de Kaysersberg (1445 – 1510) : predikis en la katedralo de Strasburgo.

Thomas Murner (1475 – 1537) franciskana monako satirema

Sebastian Brandt (1457 – 1521): aŭtoro de la *Navo de la malsaĝuloj*

Johann Fischart (1485 – 1547) : Verkis gargantuece!!!

Vi konstatas, ke tiam ili ankoraŭ afiŝis sian elitecon kaj erudicion per latinigo de sia nomo. Tial ili plej certe ankoraŭ ne tiom influis la simplan laborantan popolon.

Paralele disvolviĝis la urba burĝaro : manlaboristoj ariĝis en korporacioj pli kaj pli influaj. La interurba kaj internacia komerco riĉigis la burĝojn kaj la bankistojn. Tiu nova klaso da urbanoj iĝis pli riĉaj ol la nobeluloj, pruntedonis monon al ili. Dume la kamparanoj daŭre restis malriĉaj kaj do sin persvadis, ke ankaŭ ili meritas pli bonan vivon! Kaj do okazis en la posta jarcento la ribeloj tra la lando, pri kiuj ni jam parolis.

Vi mem antaŭ kelkaj jaroj povis konstati, ke kiam naskiĝas „revolucia printempo“ en iu lando aŭ regiono, ĉio dependas pri la ĝusta momento, la nombro de la konvinkitoj kaj la bonŝanco. Ofte alvenas tuj la „vintro“ antaŭ ol bela agrabla somero transformas la burĝonojn al vivnutraj fruktoj!!!

Post longa tumulta transira periodo sekvis **La tridekjara milito (1618 – 1648):**

Tio estis la reakcio de la katolikaj potencoj. Kaj denove trakuris nian regionon diversnacia kaj diversreligia soldataro.

La katolikaj Habsburgoj kompreneble deziris lukti en la Sankta Romia Imperio de Ĝermana Nacieco kontraŭ la regionoj en sia imperio, kies estroj elektis la protestantismon (ekzemple en ĉefaj regionoj). Des pli katolikaj estis la hispana branĉo de la Habsburgoj, kiun kompreneble la papo ege subtenis.

Protestantaj estis Svedio kaj la Unuiĝintaj Provincoj de Nederlando. Tiuj do venis helpi la protestantajjn urbojn, ŝtatojn kaj regionojn. Laŭdire la svedoj buĉis plej amase la katolikajn urbojn kaj vilaĝojn de la regiono. (Ĉar ankaŭ ĉe ni ekzistis tiam mozaiko, kunmetaĵo da katolikaj vilaĝoj kaj protestantaj).

Kio pri la franca reĝlando katolika? Kvankam la Habsburgoj katolikis, la franca katolika reĝo Ludoviko la 13-a (kiu sialande batalis kontraŭ siaj protestantoj) ankaŭ batalis kontraŭ la Habsburgoj, ĉar li ja deziris malfortigi tiun alian eŭropan (eĉ mondan) grandpotencon!

La 24-an de oktobro 1648 estas subskribita la pactraktato de **Münster** en Vestfalia inter la franca reĝlando kaj la Sankta Imperio. Jam **la 8-an de septembro 1648** sekvis la pactraktato de **Osnabrück** inter la Sankta Romia Imperio kaj Svedio.

Ek al francigo de la regiono!

Tiu dato de 1648 ne signifis, ke tuj la tuta Elzaso estis intergrita al la franca reĝlando. Tio okazis iom post iom. Multnombraj germanaj princoj konservis siajn bienojn en Elzaso, kiuj restis administritaj laŭ la leĝoj de la Sankta Imperio, antaŭ ol ili definitive integriĝis al Francio. Tiu rajto estis menciita en la traktato.

Kaj la urboj, kiuj kutimis libere sin regi sen enmiksiĝo de imperiestro, kiu plejofte troviĝis malproksime, ne tuj akceptis sin submeti al suverena absolutista ŝtato.

La sudo de Elzaso, kiu plejparte apartenis al la Habsburgoj rapide iĝis franca. **Krom la Libera Respubliko Mulhouse:** tiu ĉi iĝis ekskluzive protestanta en 1529. Ĝi sin ligis al Svisio kontraŭ la Habsburgoj. Dogana blokado asfiksiis la urbon, ĉar ĝi estis iu enklavo en Francio. La urba konsilio do voĉdonis favore al la integriĝo en la franca respubliko, sed tio okazis nur la **15-an de marto 1798**. Kontentis unue la pli kaj pli riĉaj industriistoj, kiuj denove pli facile povis vendi siajn ŝtofojn.)

La dek urboj de la ligo restis malamikoj de la franca reĝo. Ekzemplo jenas: dum ribeloj, ĉefe en Loreno, kontraŭ la tro altaj impostoj, la kardinalo Mazarin deziris rifuĝi en Elzaso, sed neniu elzasa urbo konsentis lin akcepti, aŭ ĉar ili estis protestantaj, aŭ ĉar ilia korinklino iris al Aŭstrio.

Colmar sin submetis en **1673** post longa opono al la franca reĝo. Fine, en **1698** oni tie eĉ instalas la **Suverenan Konsilion de Alzaco.**

Strasburgo iĝis franca nur en 1681 post kapitulaco antaŭ 30 000 soldatoj sub la personaj ordonoj de Ludoviko la 14-a. Tiu ĉi detruigis vastajn remparojn kaj redonis la katedralon al la katolikoj.

Sed iom post iom la reĝo uzis la forton kaj sendis la mareŝalon Turenne por konkeri la urbojn. Ekzemple Turckheim, urbo de la ligo, estis detruita kaj la loĝantaro masakrita en 1675 dum la batalo de Turckheim. Nun troviĝas tie monumento je la gloro de Turenne... kiun kelkaj aŭtonomistoj eksplodigis antaŭ kelkdeko da jaroj kaj oni ĝin tuj rekonstruis!

Ĉar la multnombraj militoj draste reduktis la loĝantaron en Elzaso, Ludoviko la 14-a invitis eksterlandanojn al ekloĝo en Elzaso kondiĉe... ke ili estu katolikaj!!!

Kio pri la lingvoj?

Iom post iom instaligis ŝtatfunkciuloj kaj oficistaro, same kiel investanta burĝaro de la centraligita jam bone organizita franca ŝtato, kaj la loka burĝaro komencis paroli la francan. La lokaj fraŭlinoj kaj edzinoj kompreneble admiris la lukson de la franca kortego kaj iĝis fieraj aparteni al ĉi tiu socio. Sed la vastan popolon oni lasis paroli siajn dialektojn, des pli ke ne ekzistis deviga lernosistemo.

La konstruo de la Kastelo de Versailles grandigis tiun admiron, ankaŭ ĉe la najbaraj dukoj kaj grafoj, en ĝermanaj landoj, kiuj siavice ekkonstruis kopiojn de Versailles kaj ekparolis la francan lingvon.

En multaj historiaj dokumentoj oni legas, ke la elzasanoj/alzasanoj kontentis, ĉar la vivo iĝis iom malpli kaosa en la regiono, kvankam ĉiuj scias, ke la francaj reĝoj daŭre ie militis kaj ke tiuj militoj kostis multe da mono, kiun devis pagi... la impostpagantoj, kiel ĉiam.

Kaj post Ludoviko la 14-a, la 15-a kaj la 16-a sin ribelis la popolo, la burĝaro, kaj okazis la Franca Revolucio.

De la Franca Revolucio ĝis nova integriĝo al la Germana Dua Imperio

Ĉefe ekde la Franca Revolucio pligravigis la lingva problemo en Elzaso, ĉar ĉefa faktoro de nacia unuigo estis konsiderita la lingvo. Jam dum la antaŭaj reĝlandoj sufiĉe strukturita administrejo tutreĝuja kontribuis al uzado de tutlande uzata sama lingvo, tutsimple pro komunikada efikeco. Sed la efiko ankoraŭ estis limigita pro la neekzisto de deviga elementa instrusistemo.

Jen du ĉefaj celoj de la revoluciuloj: tutnacia deviga instrusistemo kaj sistema instruado de la franca lingvo.

Aldonu al tio pli kaj pli efikan propagandon, ekzemple de la fama **Abato Grégoire**. Li estis ege klera sacerdoto, kiu subtenis la revoluciulojn, iĝis membro de la Konstitucia Asembleo kaj postulis ne nur la kompletan forigon de la servuteco kaj de la privilegioj, sed eĉ agadis por la ĝenerala individua balotrajto.

Li ankaŭ kunfondis la inĝenieran superan lernejon Arts et Métiers kaj la Instituton pri la Longitudoj laboranta pri geografio kaj astronomio. Do: kapablulo!

Sed ĉi tie mi ĉefe insistu pri la jeno:

Ekde la 13-a de aŭgusto 1790 (do unu jaron post la komenciĝo de la franca revolucio) li lanĉis en la Konstitucia Asembleo enketon pri la dialektoj, misfamige „patois“ (patua), kaj kutimoj de la homoj loĝantaj en la kamparo. Jam en 1793, sine de Komitato pri Publika Instruado, li klopodis elradikigi la dialektojn. La franca lingvo iĝu universala! Necesis do forigi **ne nur** ĉiujn dialektojn parolatajn tiam en Francio, sed ankaŭ aliajn lingvojn de minoritataj popoloj (jidiŝ kaj kreolaj lingvoj de la kolonioj). Por li universala franca lingvo estas la plej taŭga maniero informi la homamasojn pri utilaj konoj, por lukti kontraŭ superstiĉoj kaj fandi ĉiujn civitanojn en nacian amason. La celo estis: krei popolon. Tiel li esperis emancipi la minoritatojn.

Li skribis tion jene en raporto:

„[...] eblas unuformigi la lingvon de granda nacio [...] Ĉi tiu entrepreno, kiu neniam estis plene realigita ĉe neniuj ajn popolo estas inda je la franca popolo, kiu centrigas ĉiujn branĉojn de la socia organizo kaj kiu devas fieri pri plej baldaŭa nura kaj nevaria uzo de la **lingvo de la libereco** sine de unueca kaj nedividebla Respubliko.“

Cetere: l'abato Grégoire parolis kaj skribis (pli malpli bone, kelkajn flue) dekon da lingvoj: la germanan, la anglan, la danan, la grekan, la italan, la latinan, la francan, la hispanan, la portugalan, la hebrean, la lokan lorenan dialekton. Oni eĉ diris, ke li studis kreolan lingvon.

Kompreneble la germana lingvo estis por la revoluciuloj la lingvo de la malamiko! Alia jakobeno, Bertrand Barère, do defendanto de la ununura nedividebla respubliko, deklaris: „La federalismo kaj la superstiĉo parolas la malaltbretonan, la kontraŭevolucio parolas itale kaj la fanatismo parolas vaske.“

Tial la lingvoj, pro la koncepto de nacia lingvo, iĝis diskriminaciaj!

Inter la germanlingvaj elzasanoj tiamaj multaj estis tamen fervoraj revoluciuloj, ĉar favoraj al la demokratiaj ideoj. Ankaŭ estis okazo aprobi la senbienigon de la ekleziuloj. Okazis egaj detruoj de monaĥejoj kaj preĝejoj fare de la plej ekstremistaj revoluciuloj, kiuj deziris krei senesceptan puran laikecon. For la religioj! Sed ili ja ankaŭ bezonis la germanan lingvon por diskonigi la tezojn de la Franca Revolucio. La aferoj kiel kutime ne nigrablankas! Mi memorigu, ke La Marseillaise estis verkita en Strasburgo por la Armeo de la Rejno. Kaj germana eksa monaĥo **Elogius SCHNEIDER** tiom englutis la ideojn de la revoluciuloj, ke li verkis poemojn je la gloro de la Franca Revolucio. Li eĉ tradukis La Marseillaise“ en la germanan lingvon. Li tiel fervoris, ke li sendis al la gilotino 30-on da homoj. Fine, kiel multaj aliaj revoluciuloj, li mem estis same ekzekutita.

Sed necesas diri, ke pli ol dum la regno de tri sinsekvaj francaj reĝoj antaŭaj, **kiuj ja ofte mem estis geedze en kontakto kun alireĝeja lingvo**, la periodo de la franca revolucio tre rapide sukcesis antaŭenigi la francigon de Elzaso.

Sekvis Napoleono la Unua, granda diktatoro kaj hombuĉisto! Nu! Ni konfesu, le li tamen sukcesis konstrui fortan ŝtaton kun leĝaro, kies bazo ankoraŭ nuntempe aktualas: la fama Code Napoléon. Denove li trovis

admirantojn en Elzaso. La elzasanoj ja ŝatas la ordon kaj post la revolucia teroro, ili sendube denove sopiris je pli kvietaj kaj trankvilaj tagoj. Napoleono kreis 1500 postenojn de generaloj kaj multaj inter ili estis el Elzaso. Mi citu nur du: lokulon, la generalon Jean RAPP, kies statuon vi povas admiri sur la Marsa Kampo (au Place Rapp) kaj la generalon Jean-Baptiste KLEBER, kies nomon havas la plej centra placo de Straburgo kaj fama strasburga liceo.

Kiel la revolucianoj, Napoleono deziris feliĉigi la alilandajn homojn kaj li sendis milojn da francoj, inter ili ankaŭ elzasanojn, sur siajn batalkampojn tra Eŭropo kaj trans la Mediteraneon. Ĉar la elzasaj soldatoj kaj oficiroj tute ne aŭ malbone parolis la francan, iuj oficiroj – verŝajne eksaj revoluciuloj jakobenaj - sufloris al li tiun mankon. La respondo de la ĉefo estis: „Lasu ilin paroli germane, ĉefas, ke ili sabru france“.

La Konkordato

Post la ekstremismaj batoj dumrevoluciaj kontraŭ la religioj la ekleziuloj denove reagis kaj sukcesis adoptigi klarajn „kondukt- kaj potencoregulojn“. Sub la impulso de Napoleono estis subskribitaj en 1801 diversaj leĝartikoloj koncernantaj la katolikan eklezion – kiu tiam plej potencis -, la reformitajn ekleziojn kalvinistan kaj luteranan (laŭ la Aŭgsburga konfesio) kaj la judan religion.

Tiu konkordato ege taŭgis por la religiemaj elzasanoj. Cetere: vi vidus, ke tiu ĉi napoleona konkordato ankoraŭ multe pli gravos iom pli ol jarcenton poste.

Post la malvenko de Waterloo kaj la malsukcesa revenoprovo de Napoleono alproprigis al si denove la regadon la malnova reĝaro:

Ludoviko la 18-a (frato de Ludoviko la 16-a) kun konstitucia reĝlando.

Karolo la 10-a: kuzo de Ludoviko la 18-a forpelita de tritaga revolucio fare de la laboristoj kaj burĝoj la 27-an, 28-an kaj 29-an de julio 1830. Sekvis la monarĥio de Julio: Louis-Philippe (Ludoviko Filipo) de 1830 ĝis 1848. Tiam ankaŭ li estis forpelita.

Vi do konstatas, ke la Granda Revolucio vekis la popolon kaj ĝis 1848 alternis progresigaj ideoj kaj reakciaj.

Finfine alvenis longa periodo de iu aŭtoritata respubliko, kiu iĝis fakte diktaturo: la regado de la princo Ludoviko Napoleono Bonaparte nomita Napoleono la 3-a. Li estis la nevo de la granda/malgranda Napoleono postrevolucia.

Mi iom rapidis, ĉar dum tiu sinsekvo de regadsistemoj Elzaso iom post iom iĝis Alzaco, dank'al la ŝtataj lernejoj kaj al la pli kaj pli multnombraj kontaktoj kun la „Francio de interno: la France de l'Intérieur“.

Sed la terminoj „demokratia respubliko“ iom post iom ankaŭ revigis aliajn eŭropanojn, inter aliaj la intelektulojn de niaj germanaj najbaroj, en Badeno, kie ili provis revolucii en 1848/1849 en la dukejo. Eĉ pli vaste antaŭvidiĝis la afero fare de filozofo: Johann Gottlieb Fichte skribis *Paroladon al la germana nacio* okaze de la napoleona okupado kaj post la venko de Napoleono en Iena (1806) kontraŭ Prusio. Tiu parolado de Fichte provis veki senton de nacio, kiu naskiĝu el la ruinoj de la Sankta Romia Imperio de Ĝermana Nacieco, kiun Napoleono nuligis tiam en Iena. Cetere: kio povus ligi tian nacion, se ne la lingvo ?

Francio donis al Prusio, al Otto von Bismarck, la okazon revenĝi en 1870 provokinte Prusion, kiu ja atendis tion! Kaj jen Elzaso/Alzaco + Loreno (fakte nur la departemento Mozelo). Ekde tiam oni parolis pri la Reichsland Elsass-Lothringen: imperia lando, sed daŭre sub aŭspicio de la imperiestro pere de iu Statthalter (guberniestro), proksimuloj de Vilhelmo la Unua poste la Dua.

Se vi komprenas, ke la ĉefe protestantaj regionoj en norda Elzaso kaj kelkaj protestantaj vozejoj valoĝojis pro la veno de la prusiaj protestantoj, vi same komprenas, ke la katolikoj, la francparolantaj elzasanoj kaj lorenanoj, same kiel la industriistoj komencis opozician sintenon, eĉ se la lastaj lerte sukcesis adaptiĝi kaj profiti, kio ankaŭ estis profito por la laboristoj!!!

Parto de la katolika eklezio daŭre ribelis kaj alvokis al revenĝo fare de la franca ŝtato, kiu intertempe iĝis postrevolucia respubliko en Parizo (La komunumo). Tiel la imperiestro Vilhelmo la 1-a, kronita en la Spegula Galerio de la Kastelo de Versailles, permesis al la alzasanoj/mozelanoj, kiuj deziris elmigri al Francio, tion fari. Proksimume 110 000 deklaris sin dezirantaj migri al Francio, sed nur 50 000 tion faris, ĉefe el la suda departemento Haut-Rhin. Ili rajtis gardi la germanan naciecon. Ni tamen informu, ke ili eĉ rajtis vendi siajn bienojn, domojn, uzinojn. Sed ili ja havis familion kaj ofte ne sufiĉe regis la francan lingvon. Multaj tiam ankaŭ migris al Usono dum pli ol jardeko, kiel ankaŭ tion faris multaj germanoj pro la malriĉeco en sia lando.

La elzasanoj/lorenanoj ricevis la rajton baloti por la parlamento en Berlino. Elektiĝis deputitoj, kiuj protestis kaj komence la homoj ofte balotis por regionaj aŭtonomistaj partio. Iuj deziris aŭtonomion nur por posta reveno al Francio, aliaj al reala aŭtonomio sine de la Imperio.

Koncerne la lingvojn nun prioritatis denove la germana tutmaniere facile lernebla fare de la popolo, kiu daŭre parolis siajn ĝermanajn dialektojn. Sed en pluraj vozejoj valoj la loĝantoj neniam parolis la ĝermanajn dialektojn, sed franclingvan dialekton. Tiu valoj ricevis dulingvajn lernolibrojn.

Kiel komunikis la aŭtonomistaj cirkloj, kiuj agadis por ricevi apartan statuson en tiu nova imperio? Ili klopodis daŭre paroli la elzasajn dialektojn kaj tiel la dialektoj retrovis viglon en la ordinara kaj en la kultura vivo. La du nacioj „germania kaj franca“ naskis alian „nacion“: Elzason. Famiĝis poetoj kaj ekfloris la teatrotrupoj en la elzasaj dialektoj (Gustav Stoskopf, la fratoj Matthis). Aliaj, kiel la karikaturisto kaj pentristo Jean-Jacques Waltz, alias HANSI, daŭre agadis por reveno al Francio, karikaturante la malnovgermanojn (ŝtatfunkciuloj, juĝistoj, oficiroj, kaj aliaj, kiuj nun alfluis.)

Sed la germana literaturo disvastiĝis ĉefe en Strasburgo. Ernst Stadler (ekspresionista poeto), René SCHICKELE (dulingva aŭtoro). Estis legitaj ĉiuj tiamaj germanlingvaj aŭtoroj kaj montritaj ĉiuj modaj teatraĵoj. La elito nun studis en la germanlingva Universitato de Strasburgo inaŭgurita la 1-an kaj la 2-an de majo 1872. Cetere: iuj konsilantoj de Bismarck maldeziris krei germanan universitaton en Strasburgo, por ke la elzasaj studentoj studu en aliaj germanaj universitatoj kaj tiamaniere estu pli rapide integritaj en la germana nacio. Sed tutmaniere en Germanio jam estis kutimo studi en diversaj germanaj aŭ aŭstraj universitatoj, laŭ ties famo, kaj tion ankaŭ faris multaj studentoj.

Ni klarigu rapide, kial sin oponis al la politiko de la kanceliero Bismarck la katolika eklezio kaj la centrista partio ZENTRUM dum la tiel nomata KULTURKAMPF: Bismarck deziris sekularigi la socion, kio signifis klare disigi religion kaj ŝtaton, ebligi civilan geedziĝon. Tio daŭris ekde 1872 ĝis 1878. Tiam ree paciĝis la rilatoj inter la ŝtato kaj la eklezio, ĉar Bismarck ja bezonis la balotantojn de la partio ZENTRUM por baloti favore al leĝoj kontraŭ la vigla socialista partio (kun Liebknecht kaj Bebel), kiu arigis pli kaj pli da laboristoj. Kaj tiam, ekde 1881, komenciĝis la laboro por la kreo de nekredbla nombro da sociaj leĝoj: leĝo pri socia asekuro, asekuroj por laboristoj havintaj laborakcidenton aŭ malsaniĝintaj, eĉ por malliberuloj laborantaj, flegado en la hospitalo, pensio ekde la 70-a vivojaro (!!!), plupago de la pensio por vidvinoj, ktp...Tia leĝkreado daŭris ĝis 1888. Ĉiuj aferoj nun konataj de ni, sed kiujn la francoj profitis nur ... en 1936 dank'al la Front Populaire (Koalicio de Maldektrulaj Partioj).

Alia grava dato por pozitivaĵo koncernanta la elzasanojn/mozelanojn: en 1911 Elzaso/Loreno ricevis Konstitucion, kiu ebligis ian aŭtonomion sine de la imperio. La Imperia lando Elzaso/Loreno estis regata de parlamento (Landtag), kies deputitoj estis elektitaj per rekta universala balotado.

Bedaŭrinde ju pli alproksimiĝis la Unua Mondmilito, des pli diktatura la imperio denove iĝis. Kaj en 1914 la elzasanoj/mozelanoj iĝis germanaj soldatoj, krom tiuj, kiel la karikaturisto/pentristo HANSI, kiuj fuĝis al Francio, ĉefe tra Svislando.

La unuaj bataloj de la Unua Mondmilito komenciĝis tuj en Elzaso ĉefe sur la vomezaj frontlinioj. Plej konatas la montaro Hartmansweilerkopf inter Colmar kaj Mulhouse kaj la valo de Munster kaj tio daŭris ĝis prekaŭ la fino de 1915. Sed poste la frontlinio kvazaŭ ne plu moviĝis.

En 1918, fine de la milito ekzistis mallonga provo de la ribeliĝintaj maristoj de la imperia mararmeo fondi socialistan respublikon de la konsilioj (aŭ de la sovetoj) – kiel en pluraj germanaj urboj, unue en la nordgermana urbo Kiel. Sciu, ke multaj elzasanoj militis en la mararmeo de Vilhelmo la 2-a. Kiel en Kiel, ankaŭ en Strasburgo la afero rapide fiaskis.

Enmarŝis la francaj trupoj akceptitaj kun entuziasmo laŭ la historiistoj! Jesja ! Oni ja promesis al la elzasanoj, ke ili povos konservi siajn apartaĵojn.

Kio okazis por 300 000 germanoj, kiuj intertempe ja loĝis en Elzaso/Mozelo?

Jam en 1915, abato Wetterlé, kiu subtenis kiel deputito en la Reichstag la elzasan aŭtonomismon partoprenis Konferencon pri Alzaco-Loreno en Parizo kaj iĝis unu inter la plej fervoraj jakobenoj. Li tiam sukcesis adoptigi la projekton pri selekto-komisionoj, kiuj ebligis etnan purigadon post la milito. Kaj tio realiĝis: ĉiuj elzasanoj ricevis per literoj signitajn identeco-kartojn:

A por francaj patriotoj kaj francoj el „interna Francio“,

B por tiuj, kiuj havis patron aŭ patrinon ne francan,

C por tiuj, kies gepatroj naskiĝis en aliancita lando aŭ neŭtrala lando.

D por „enmigrintoj“ el malamikaj landoj (Germanio, Aŭstrio, Hungario, same por ties infanoj, kiuj naskiĝis en Elzaso).

Tiel estis forpelitaj ĉirkaŭ 130 000 germanoj. Komence ili devis transpaŝi la landlimon piede, sub la insultoj kaj kraĉado de la novaj patriotoj (parton de tiuj kraĉantaj patriotoj oni eĉ pagis !!!). Nur eblis kunpreni la plej necesajn havaĵojn, ĉion alian oni konfiskis al ili. Pli poste ili rajtis forvendi aferojn kaj oni elfranciigis ilin per trajne. (Se vi rememoras pri la kondiĉoj laŭ kiuj eblis forlasi Elzason post 1871, la forpelado de la germanoj post 1918 ne estas tre glora ago fare de Francio).

Alvenis nun nova armeo da funkciuloj kaj da instruistoj parolantaj nur la francan lingvon. La lokaj instruistoj ja ne plu kapablis instrui per la franca. Ili do devis akcepti iun tutoradon fare de kolego de la

„Interno de Francio“, kiu krome estis eĉ pli bone pagata!!! Aŭ ili devis unue staĝumi en Interna Francio antaŭ ol ree instrui en Elzaso aŭ Mozelo.

Baldaŭ sciiĝis, ke la elzasanoj kaj mozelanoj ne rajtos libere elekti per libera voĉdonado, ĉu ili deziras iĝi parto de la nedividebla franca respubliko aŭ iĝi aŭtonoma regiono.

Ĉu vi kredas, ke la entuziasmo tiom grandis por Francio?

La franca respubliko krome subite ne plu deziris konservi en Elzaso/Mozelo ĉiujn favorajn tiuepoke avangardajn leĝojn, kiujn ili ĝuis dum la regado de la germanoj! Komenciĝis ribeloj!

La aferon solvis mozela advokato, la juna deputito **Robert SCHUMAN**: li defendis la lokan leĝaron. (Temas pri la sama Robert SCHUMAN, kiu – post la Dua Mondmilito - surreligis kun **Jean MONNET** la Eŭropan Union)

Vi nun komprenas, kial inter la du mondmilitoj granda parto de la elzasanoj voĉdonis favore al aŭtonomistaj politikistoj, des pli ke la jakobenaj tendencoj en la Interna Francio ĉiel klopodis nuligi ĉiajn ajn regionismojn.

Vi certe komprenas, ke ne eblis en la daŭro de kelkaj jaroj ŝanĝi germanparolantojn al regantoj de la franca lingvo. Do la plej multaj regionaj gazetoj daŭre aperis germanlingve, aliaj dulingve. La elzasanoj ankaŭ aŭskultis radiojn, ekzemple la germanajn kaj la svisajn radiojn. Kaj en 1933 komenciĝis la problemoj por la aŭtonomistoj, kiuj nun luktis por aŭtonoma regiono en Francio: iom post iom oni akuzis ilin favori la naziojn, kvankam plej multaj inter ili estis fervoraj kristanoj.

Kaj jen 1939: post la rapida venko de Hitler, Elzaso denove iĝis germana. Hitler konsideris Elzason/Mozelon kiel germanan teritorion kaj tuj la loĝantoj estis devigataj ree ŝanĝi la lingvon kaj germanigi siajn antaŭnomojn. La instruado denove iĝis germanlingva kaj rapide la elzasanoj kaj mozelanoj malkovris la veran vizaĝon de la reĝimo, ke tiu tiel nomata Tria Regno „Miljara“ neniel similis la Duan Imperion. Ĉefe la gejunuloj sentis tion en la militista disciplino de la lernejoj kaj liceoj, okazis promociado de la apudarmeaj trupoj. Komence la nazioj diris, ke ili ne bezonas tiujn elzasanojn/mozelanojn, sed post Stalingrado, kiam la venko ne plu certis, ili bezonis la „samrasanojn“. Do en 1943 pluraj aĝklasoj estis enregimentitaj, iuj eĉ en la SS-trupoj (ne nur volontuloj) por batali kontraŭ la armeoj de Stalin. Kiam ili estis kaptitaj de la sovetanoj ili estis ofte konsideritaj germanoj kaj enprizonigitaj. Ili ricevis la nomon : „la kontraŭvoluloj – Les malgré-nous)

Ni reliefigu, ke en Elzaso la nazioj instalas koncentrejon, la koncentrejon **ŜTRUTHOF** apud la urbo Schirmeck. Ili tie enprizonigis multajn oponentojn kaj ankaŭ judojn kaj ciganojn. Medicinaj eksperimentoj estis faritaj tie fare de naziaj profesoroj de la universitato de Strasburgo.

Kio pri la aŭtonomistoj, defendantoj de la germana lingvo ? Kiel la franca ŝtato, ankaŭ la nazioj ne ŝatis la aŭtonomistojn, ankaŭ la nazioj ne toleris, ke iu kapo elstaru inter la aliaj! Tamen ili uzis ilin, postulante, ke ties gvidantoj promociu la reĝimon. Iuj tion faris, bonvole aŭ pro timo, aliaj, malmultaj, rezistis, inter aliaj Joseph Rossé, instruisto kaj gvidanto de kristana sindikato de instruistoj inter ambaŭ militoj. Post eksigo el la statuto de ŝtatfunkciulo, li iĝis redaktoro de la gazeto Elsässer Kurier, direktoro de la eldonejo ALSATIA kaj uzis monon de la firmao por agadi kontraŭ la nazioj. Li ekzemple partoprenis en la komploto de kolonelo Staufenberg kontraŭ Hitler.

Post la Dua Mondmilito li tamen estis arestita kaj enprizonigita kun aliaj aŭtonomistaj gvidantoj kaj kondamnita de postmilita escepta tribunalo al punlaborado. Li malsaniĝis en la malliberejo kaj mortis en 1957. Granda estis la partoprenantaro en la funebraj ceremonioj. Aliaj eksaj aŭtonomistoj (eksaj deputitoj, regionaj elektitoj) malĝuste suspektitaj estis Eugène Ricklin, abato Xavier Haegy, Jean Keppi kaj Marcel Sturmel.

Ekde la 8-a de majo 1945, jen Elzaso/Mozelo denove francaj. Kompreneble, kiel ĉiam en tiaj periodoj okazis venĝoj, kiel tio jam okazis post la Unua Mondmilito.

La loĝantoj reprenis siajn franclingvajn antaŭnomojn – tiel iu japana esploristo vizitinta Elzason foje diris: Elzasanoj estas homoj kun germana familia nomo kaj franca persona nomo.“

Tiu nazia epizodo estis traŭmo, en la tuta Francio kaj ĉefe en Elzaso. Jen la turnopunkto por la elzasaj dialektoj kaj la germana lingvo: la regionaj gazetoj nepre devis aperi almenaŭ en dulingva versio: nepre la kajero pri sporto estu en la franca (ĉar la gejunuloj tion ja legas ... kaj nepre legu, ili sin trejnu en la franca). La plej gravaj regionaj gazetoj DNA (Dernières Nouvelles d'Alsace kaj L'Alsace) plu havis du versiojn, dulingvan kaj tute franclingvan.

La instruistoj ricevis la taskon malpermesi al la gelernantoj paroli la elzasan dialekton en la lernejo. Nu! Ne ĉiuj geinstruistoj sekvis tiun ĉi ordonon. Sed iuj eĉ uzis iun sistemon de „punobjekto“, kiun ricevu tiu, kiu en la paŭzo parolas la elzasan. Li redonu ĝin al sekva, kiun li aŭdis paroli la dialekton kaj fine de la paŭzo, la lasta ricevis punon. Nun, iom post iom, la instruistoj de la elementaj lernejoj iĝis membroj de la maldekstra sindikato SNI (Nacia Sindikato de la Instruistoj), kiu senkaŝe sin oponis

al la praktikado de la dialekto kaj la instruado de la germana lingvo, same poste la Snes (Nacia Sindikato de la Instruistoj de la Postelementa Instruado). Regule aperis artikoloj en la loka gazetar, ankaŭ de legantoj, ke ne eblas lerni kontentige du lingvojn samtempe.

Tre ofte la gazetoj citis la eldiron de la habsburga Karolo La Kvina: „**Mi alparolas Dion hispane, la virinojn itale, la virojn france kaj mian ĉevalon germane!**“

En iuj liceoj, kaj eĉ en busoj, dum mia infanaĝo oni povis vidi afiŝojn, kiuj deklaris: Il est chic de parler français.(Mojosas paroli la francan!).

Kaj ofte legeblis aŭ aŭdeblis la aserto: **la franca estas la plej bela lingvo en la mondo!**

Krome pli kaj pli aŭdiĝis moko pri la germana akĉento de la homoj, do la homoj komencis honti pri sia akĉento. Ili do prefere silentis.

Fakte la hitlera, nazia periodo kontribuis al malamo de la germana lingvo fare de la elzasanaj kaj mozelanoj. La franca ŝtato uzis tiun honton. Tiel ĉio germaneca iĝis nazia! Kaj ĉiu provo defendi sian germanan kulturon estis asimilita al defendo de nazismo. La germana lingvo iĝis iom post iom la nazia lingvo. (Kaj bedaŭrinde eĉ nuntempe tiu sinteno de tempo al tempo sentiĝas en Francio, kaj eĉ politikistoj kaj eĉ ĵurnalistoj dekstrulaj kaj maldekstrulaj.)

Ankoraŭ nuntempe okazas la jeno: en la jam cititaj regionaj gazetoj ofte aperas artikoloj pri la nun pli kaj pli oftaj dulingvaj francgermanaj lernejoj kaj – ĉu hazarde – sur la sama aŭ la apuda paĝo, alia artikolo pri la Dua Mondmilito kaj la nazia teroro!!!

La rezulto de tiaj sistemaj atakoj kontraŭ la germaneco estis la jena: hejme la gepatroj ne plu parolis la dialekton kun siaj geinfanoj, ĉar ili volis esti „veraj francoj“, multaj iĝis eĉ 150-procentaj francoj. Mi rememorigu tamen, ke neniu bedaŭris la nazian epokon, ĉefe tiuj kiuj estis enregimentigitaj kontraŭvole en la hitleran armeon, batalis en Rusio kaj estis tie enprizonigitaj, ekzemple en Tambov ! Kaj la generalo De Gaulle kaj ties kunbatalantoj, kiuj liberigis Elzason kun la aliancitaj britoj kaj usonanoj en kvazaŭ ĉiu vilaĝo trovas sian stratnomon aŭ placon. Ĉiuj en ĉi tiu regiono sin sentas francoj, sed multaj bedaŭras, ke en nia lando la rajto je praktikado de nia regiona lingvo fakte ne estas vera rajto.

Iu ŝanĝiĝo okazis en 1968, kiam la studentoj ribelis en la universitato de Strasburgo. Ekblovis vento de libereco! Neditaĵoj subite estis dritaj!

Kaj kreiĝis Asocio René SCHICKELE, kiu promociis dulingvismon. Temas pri sama kultura asocio, kiel niaj esperantistaj. Kun la sama funkciado pere de fervoraj aktivuloj. Ĝi ankaŭ funkciigis eldonejon kaj libroservon.

Ĉi asocio elektis la nomon „René SCHICKELE“. Jam mi citis ĉi tiun faman dulingvan elzasan pacistan verkiston, admiranton de la socialista politikisto Jean Jaurès kaj ĉefredaktoro de la ekspresionista literatura revuo *Der Stürmer*. Li estas simbolo de racia promociado de la germana lingvo inter la militoj (lia patrino estis francino kaj lia patro elzaso). Li sin engaĝis por demokratia lukto por pacistaj rilatoj inter Germanio kaj Francio. Kiam alvenis Hitler ankaŭ li rifuĝis kiel multaj aliaj artistoj kaj judoj al la mediteranea maro, apud Toulon, en Sanary kaj Vence, kie li forpasis en 1940.

Dank'al la Asocio René SCHICKELE iom post iom konatiĝis elzasaj dulingvaj poetoj kaj kantistoj, André WECKMANN, Adrien FINK, Conrad Winter, Emile Storck, Paul Georges Koch, Gérard Léser, Sylvie Reff, René Eglès, Roger Siffer, ktp...

Efikis la jena afiŝo:

- Avo, kial ne plu ekzistas cikonioj en elzaso?

- Vi sciu, bubo, kiam la cikonioj superflugas Elzason, ili ĉie aŭdas paroli la francan. Tiam ili kredas, ke ili ankoraŭ ne alvenis.

Tiam ne nur en Elzaso, ankaŭ en aliaj francaj kaj eŭropaj regionoj aktivuloj klopodis agnoskigi la rajton de minoritataj lingvoj.

Ĝis tiuj sepdekaj jaroj la elzasaj gelernantoj en la elementaj lernejoj lernis ankaŭ la germanan, sed ne sisteme, ofte la kursoj ne okazis pro manko de taŭga instruisto kaj malsufiĉis la nombro de la horoj.

Novan instigon lanĉis ĝenerala inspektoro de la Nacia Edukado, Georges HOLDERITH, kiu klopodis dinamiki la kursojn en la elementaj lernejoj kaj kreis metodon specifan por parolantoj de la elzasaj dialektoj en la postelementaj lernejoj. Li konsilis krei specifajn grupojn por parolantoj de la dialektoj kaj por la nuraj franclingvanoj. Kaj tio ebligis kuraĝigi kaj tiujn kaj tiujn ĉi, ĉiu lernu laŭ sia ritmo. Belega periodo por mi, entuziasme instruanta tiamaniere kun rezultoj ege pozitivaj.

En la okdekaj jaroj, post la venko de la socialista prezidento Mitterrand, rektoro de la Akademio de Strasburgo, la rektoro Deyon, deklaris, ke la germana lingvo estas lingvo de Elzaso kaj Mozelo! Imagu!!! Naskiĝis tiam grandaj esperoj por pli justa pritrakto de nia specifa kulturo!

La postmilita poeto kaj verkisto André WECKMANN – li verkis france, elzase kaj germane – ellaboris specifan ambician aron da lernolibroj. Bedaŭrinde iom tro malfrue, ĉar malpli kaj malpli da gelernantoj pluparolis la dialekton.

Sed por la kontraŭuloj de ĉia regionismo, ankaŭ maldekstre, tio estis provoko kaj tiel pliiĝis la propagando kontraŭa de la jakobenoj, pli kaj pli ofte aperis en la lernejoj kaj gimnazioj gelernantoj, kiuj deklaris: mi ne ŝatas la germanan! Oni enkapigis al ili, ke temas pri lingvo de la pasinto, lingvo de la geavoj! Do malmoderna!

Intertempe ja disvolviĝis la instruado de la mondlingvo, „la angla“! Pli kaj pli da gelernantoj ĝin elektis kiel unuan fremdan lingvon kaj venis genia ideo de la oponentoj: oferti la hispanan. La gelernantoj do pli kaj pli ofte elektis la anglan kaj la hispanan, kaj ne plu la germanan. Sekve kreiĝis homgrupoj je maksimume 40 km de la germana landlimo, kiuj nun ne plu kapablas kompreni kaj paroli la lingvon de siaj gepatroj, dum oni oficiale laŭdis kaj daŭre laŭdas la francgermanan amikecon!

Fine tamen okazis premoj fare de kelkaj klarvidaj politikistoj dektraj kaj maldekstraj por ebligi la samtempan eklernadon de la germana kaj de la angla en la postelementaj lernejoj. Unue por laŭkapable selektitaj gelernantoj kaj iom post iom por pli kaj pli multaj.

Pli kaj pli multaj klasoj elementaj kaj postelementaj ricevas dulingvan instruadon, do instruadon de diversaj fakoj per la germana kaj per la franca. Tiujn klasojn private lanĉis membroj de la asocio ABC-Zweisprachigkeit (ABC-Dulingveco). Pro premo de gepatroj ankaŭ la publikaj lernejoj devis proponi dulingvajn klasojn. Ties gelernantoj iĝas ege kapablaj en la germana lingvo, ili eĉ povas sin prezenti ĉe la franca bakalaŭro kaj la germana Abitur. Kio malfermas al ili du grandajn kulturojn kaj ankaŭ multajn profesiajn eblecojn.

Kaj kio pri la nuna situacio?

Nu! Imagu! Mankas nun instruistoj pri la germana lingvo, kaj en la elementaj lernejoj, kaj en la postelementaj! Ĉu subita fervoro por la germana? Ne, sed multiĝis la senlaboruloj en la regiono kaj mankas laborfortoj en Germanio. Sed por multaj postenoj ja necesas en Germanio kaj en la bazela regiono de Svislando regi la germanan.

Ekzemplo: du trionoj de la dungitoj de la plej sukcesa amuzparko trans la Rejno, la fama Europa-Park estas francoj.

La ŝtataj instancoj provas dungi germanajn geinstruistojn, sed ne pretas ilin pagi kiel ili estus pagitaj en Germanio, malmultaj do venas.

Certe ne malaperis la dialekto en nia regiono, sed ĉiuj elzasanaj kompreneble parolas la francan lingvon, ĝin parolas flue, partoprenas la ĝuadon de la kulturaj aranĝoj franclingvaj, akceptas kun ĝojo ĉiujn francojn, kiuj vizitas la regionon kaj alparolas ilin en la franca, kiam ili konstatas, ke li/ŝi ne komprenas la elzasan.

Malgraŭ ĉiuj mankoj por atingi de ĝenerala dulingveco Elzaso restas la franca regiono, en kiu la regiona lingvo ankoraŭ plej ofte parolatas. Pluekzistas amaso da teatrotrupoj elzaslingvaj, multego da muzikaj grandeventoj, kie ludas kaj kantas aŭstraj aŭ bavaraĵaj popolaj artistoj. Iuj junaj elzasaj kantistoj eĉ karieras en Germanio per tiaj popolaj kantoj aŭ ŝlagroj. Multegaj elzasaj familioj postulas krom la francaj televidokanaloj la germanajn televidokanalojn per la satelito ASTRA. Ofte ĉefe por rigardi la futbalmatĉojn, ĉar ili opinias, ke la komentoj estas pli sobraj!!!

(Parenteze: apud la francaj publikaj televidokanaloj kaj ARTE, la francgermana kulturkanalo, multegas la privataj televidokanaloj, kies programo ĉefe konsistas el reklamoj kaj usondevenaj aŭ usonstilaj filmoj kaj serioj! Imagu: kiam tiaj kanaloj ankoraŭ ne ekzistis, miaj gelernantoj ofte rakontis al mi pri vidita/aŭskultita oper- aŭ operetokantisto germanlingva, aŭ pri interesa teatraĵo. Nun eĉ la publikaj televidkanaloj imitas la privatajn kaj elsendas laŭ nivelo mizera.)

En 2015 la lastan baton donis al ĉia ajn apartismo la franca socialista registaro per la kreo de la grandregiono „Grand Est“, kiu inkluzivigas la eksajn regionojn Ĉampanio, Alzaco, Loreno, Ardenoj“. Do la nomoj mem de la regionoj malaperas oficiale!!!

Unu fakto tamen maltrankviligas la promociantojn de la regionaj dialektoj: la nomoj de novaj stratoj kaj kvartaloj ricevas pli kaj pli ofte franclingvajn nomojn.

Kiuj elzasanaj vere deziras plubatali por sia dialekto kaj sia specifa kulturo? Laŭ mi, malmultaj. Jesja, la regiona partio Unser Länd (Nia lando), dum iuj balotoj atingis 9% de la balotintoj, en iuj lokoj.

Kiel la esperantistaj „raŭmismoj“, multaj lokanoj nun ĝuas la plezuron praktiki la lingvon inter geamikoj kaj najbaroj (se eblas), kaj ĉefe ili ĝuas - dank'al sia dulingveco - la kapablon sin senti hejme ekde la bordo de la atlantika oceano kaj de la Mediteraneo, ĝis la orientaj limoj de Germanio kaj de

Austrio, kaj eĉ trans tiuj limoj, kie la germana lingvo ankoraŭ estas parolata. Oni sin sentas hejme en ĉiuj tiuj regionoj, ĉar oni per la lingvo kapablas ĝui ties kulturon.

Lasta konsideroj kaj demandoj:

Okazas multaj miksaj geedziĝoj, kun homoj el „interna Francio“ aŭ el eksterlando, aŭ kun enmigrintoj. La „ĝermanecaj“ elzasanoj iĝis nun minoritato en sia origina regiono. La plejmulto do ne plu sentas sin specifaj kompare kun la resto de la loĝantoj de Francio. Ĉu do plubatali por savi nian regionan kulturon? Ĉu la lerneja sistemo kapablos denove produkti sufiĉe multajn dulingvulojn? Ĉi-foje la du lingvoj origine ne estus la franca kaj la dialekto, sed la franca kaj la germana. Ĉu devige por ĉiuj enloĝantoj?

Krome: iuj promociantoj de aŭtonoma dulingva regiono estas fervoraj kredantoj je federacia Eŭropo sen ŝtatoj, en iu Eŭropo de la regionoj. Sed vi ja scias, ke la lasta plej unueca ŝtato en la nuna Eŭropo estas Francio kaj tial Francio deziras garantii sian potencon ene de Eŭropo. Ni do ne tro kredu pri federaciismo!

Jesja! Plurevi ni daŭre povas! Revi pri iu nova Luksemburgio, kie ĉiuj enloĝantoj parolus la lokan dialekton, la germanan kaj la francan lingvon kaj plu lernos la anglan (aŭ, se la revado iĝus ankoraŭ pli intensa, Esperanton!!!!). Imagu eĉ, ke ni havus tiom da bankoj kiom havas Luksemburgio kaj tiel florantan ekonomion, ke la eŭropaj instancoj en Strasburgo troviĝus en vere plurlingva medio!!!

Ĝis tiam ni fieru pri niaj lokaj produktoj, niaj vinoj, niaj bieroj, niaj brecoj, niaj flamkukoj, niaj kugelhupfoj, nia saŭrkraŭto kun ŝinko kaj kolbasetoj, niaj printempaj asparagoj, ktp...

el

Aldonaĵo:

Antaŭ ol ĉi tie iu lokano starigos al mi demandon, mi ĝin starigas mem: vi nur mallonge parolis pri la departemento Mozelo, kiu ja travivis la saman historion kiel la tuta Elzaso. Kial?

Mi precizigu: ekde 1871 oni kutimis nomi la teritoriojn aneksitajn de la prusianoj „Elzaso/Loreno“, kvankam – kiel jam klarigite – temas pri Elzaso kaj la ĝermanlingva departemento Mozelo. Sed ankaŭ tio ne tute ĝustas, ĉar laŭlonge de la tiam francgermana limo ankaŭ estis integritaj pluraj vilaĝoj kun parolantoj de la franca.

Vi certe scias, ke la lorena esperantisto Raymond SCHWARTZ, en sia elstara romano, bedaŭrinde ne plu reeldonita *Kiel akvo de l'rivero* rakontas pri sia familio, kiu travivis tiun ĉi periodon ambaŭflanke de la tiama limo. Schwartz mem iĝis oficiro en la armeo de la Kaiser. Sed post la Unua Mondmilito li migris al Parizo.

En tiu romano li promocias la francgermanan amikecon, ne de la ŝtatoj, sed de la homoj! Nia plej esperantista valoro: la amikeco de homoj kun homoj trans ĉiaj limoj. Ĉu ne?

Nu! La mozelanoj, krom en kelkaj urbetoj, ŝajne malpli batalas por sia dialekto. Ili (la departemento Mozelo) ja tuj post la Unua Mondmilito ree iĝis departemento kaj ekonomie ĉefe rilatas kun la granda regiono Loreno franclingva.

el